

Traduka laborfolio por la inform-materialoj uzotaj por la
21a de februaro 2020, tago de la gepatra (patrina) lingvo

Klariĝa teksto pri la temo

sendota al : traduko (ĉe) [linguistic-rights.org](http://www.linguistic-rights.org) + [renato.corsetti \(ĉe\) gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)

La aktuala ĝusta ekzemplo de la tradukenda teksto estas tie en esperanto:

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020/#EO>

Atentu!

Eventuale ekzistis simila teksto en via lingvo en la antaŭaj jaroj
[2016](#) - [2017](#) - [2018](#) - [2019](#) - tamen, la tekstoj ne estis ekzakte la samaj!

Bonvolu uzi por via traduko la ĉi subajn alineojn,
enskribante viajn tradukojn en la malplenajn blankajn spacojn
sub la esperantaj tekstoj:

VIA LINGVO ESTAS:

(bv. skribi la lingvonomon esperante kaj via-alfabete)

	↓ <i>Teksteroj por traduki vialingven</i> ↓	<i>Rimarkoj</i>
1 esperanto	21a de februaro 2020 Internacia Tago de la Gepatra Lingvo	← bonvolu ruĝigi la vortojn ankaŭ vialingve, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
1 via lingvo		

2 esperanto	La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako (Orienta Banglujo), ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala (bangla / bn / বাংলা ভাষা), kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo "pli granda", parolata de la fortuloj de tiu momento.	tion (la lingvonomon vialingve) skribu en via lingvo kaj alfabeto, tion lasu senmodife
2 via lingvo		
3 esperanto	Temas pri io, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio, ne nur en Azio, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj, kiel en pluraj eŭropaj landoj, kaj tute aparte en pluraj ekstereŭropaj kontinentoj rilate al la indiĝenaj lingvoj, al la lingvoj de la praloĝantoj. Tio praktike okazas ĝenerale per la streboj, devigoj, iamaniera altrudo de la uzo de lingvo, plejparte de la angla, fare de iu ekonomia, politika aŭ militismema, ŝtata grandpotenco, por fortigi sian pozicion en la mondo - malfavore al la lokaj gepatraj lingvoj. " <i>Mi estas la fortulo, vi silentu, aŭ eventuale, se vi volas paroli, vi parolu mian lingvon</i> ".	← bonvolu ruĝigi la vortojn ankaŭ vialingve, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
3 via lingvo		
4 esperanto	Tiel okazas iom post iom la malapero, morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdias sian grandan intelektan riĉecon - kiel pri tio atentigas ankaŭ multaj lingvistoj, kaj en 2019 aparte atentigas UN kaj Unesko. En mesaĝo al Universala Esperanto-Asocio en 2018, Audrey Azoulay, ĝenerala direktoro de Unesko diris: " <i>Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias, ke ili malaperas nuntempe laŭ la ritmo de po unu ĉiujn du semajnojn - kio estas neriparebla perdo por la homa heredaĵo. Ni devas defendi ankaŭ la plurlingvismon en la instruado, per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la</i>	citaĵo el la Unesko-mesaĝo : ← bonvolu ruĝigi la vortojn ankaŭ vialingve, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo

	<i>virtuala spaco de la interreto, por ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco de ĉiuj homgrupoj; por ke ĉiu povu lerni pri sia historio, sia identeco, ĉerpante el la simbolaj fontoj de sia origina etno."</i> [1]	
4 via lingvo		
5 esperanto	Krom la socia maljusteco kaj psikologiaj problemoj rezultantaj el la perdo de uzeblo de sia gepatra lingvo, kaj pro nesufiĉa sperto en la uzo de la altrudata lingvo, necesas konscii ankaŭ pri aliaj faktoj: la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo. (Fina deklaro, 64a UN-NRO-konferenco, Bonn, 2011 [2], Terralingua [3])	
5 via lingvo		
6 esperanto	Je la 17-a de novembro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la <i>Internacia Tago de la Gepatra Lingvo</i> . En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj [4] alvokis la membroŝtatojn por "Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo", samtempe deklarante la jaron <i>2008 Internacia Jaro de Lingvoj</i> . [5]	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
6 via lingvo		
7 esperanto	En 2014 UNESKO aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova . [6]	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
7 via lingvo		

8 esperanto	En 2016 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj adoptis rezolucion proklamante la jaron 2019 la <i>Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj</i> , surbaze de la rekomendoj de la <i>Konstanta Forumo pri Indiĝenaj Aferoj</i> (UNPFII/Foro Permanente/Постоянный форум/Instance Permanente). Tiam la Forumo komunikis ke 40 procentoj de la ĉirkaŭ 6'700 lingvoj parolataj en la mondo estas minacataj je malapero. La fakto, ke la plimulto de tiuj minacataj lingvoj estas indiĝenaj lingvoj, endanĝerigas la kulturojn kaj kono-sistemojn, en kiuj ili estas parolataj. [7]	← bonvolu traduki kaj ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo; la (verdajn partojn en parentezo) lasu sen modifo.
8 via lingvo		
9 esperanto	Kiel rilatas al ĉio ĉi <i>Esperanto</i> ? La kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la diverseco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj, kiujn la tutmonda movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj, volas neniun lingvon malaperigi, ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco en la inter-komunikado. Ĉi-cele, de multaj jaroj, <i>Universala Esperanto-Asocio (UEA)</i> solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki, ke la internacia lingvo Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kia estas la lingvoj de grandaj ekonomiaj kaj militistaj potencoj.	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
9 via lingvo		
10 esperanto	Esperanto fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdís FINNBOGADÓTTIR (prezidento de la Respubliko Islando inter 1980-1996): " <i>Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.</i> " [8]	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo Por via informo : tiu citaĵo ekzistas jam en la jenaj 23 lingvoj: araba, bengala,

		aŝaninka, dana, germana, greka/helena, angla, esperanta, hispana, finna, franca, hebrea, indonezia, islanda, itala, japana, korea, nederlanda, rusa, anar-samea, telugua, turka, ĉina, je tiu adreso: http://www.linguistic-rights.org/uea/Justa-Komunikado-Lingva-Justeco-Vigdis-FINNBOGADOTTIR-Islando.pdf - do en tiujn lingvojn ne necesas ree traduki, simple kopii la 2 frazojn el tiu alia dokumento/pdf.
10 via lingvo		
11 esperanto	Eble iu ankoraŭ demandas: "Kial ĝuste Esperanto?". La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ	

	akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter ĉiuj popoloj.	
11 via lingvo		
12 esperanto	<i>"Por internacia kunlaboro, por indiĝenaj popoloj, por pluraj multlingvaj landoj Esperanto estus bona solvo."</i> (Dr. Tove Skutnabb-Kangas [9])	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
12 via lingvo		
13 esperanto	<i>"Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto."</i> (Prof. Robert Phillipson [10]).	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
13 via lingvo		
14 esperanto	Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj.	
14 via lingvo		
15 esperanto	<i>"... Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon."</i> (Rita Izsák-Ndiaye, Speciala Raportisto de UN pri minoritatoj [11])	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
15 via lingvo		

16 esperanto	Sekve, la uzo de la ponto-lingvo Esperanto en internacia komunikado realigas lingvan egalrajtecon kaj helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde la 21-an de februaro.	← bonvolu ruĝigi la vortojn, kiuj estas ruĝaj en tiu frazo
16 via lingvo		
17 esperanto	- Ekkonu la internacian lingvon, Esperanton, per www.lernu.net ! [12]	
17 via lingvo		
18 esperanto	<i>Informa Fakto de Universala Esperanto-Asocio, UEA [13] Renato Corsetti, Stefano Keller, Peter Oliver, Emilio Cid, Vasil Kadifeli. Afiŝoj: © Peter Oliver/UEA kaj tradukintoj el diversaj landoj. http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020/</i>	
18 via lingvo		
19 esperanto	Kontaktoj: (((bv. indiki ĉi tie la nomon kaj retejan (aŭ stratan) adreson de vialanda esperanta societo, grupo, kaj eventualan facebook-grupan/paĝan adreson - aŭ vian personan kontakteblon [se vi konsentas] se ne ekzistus landa, loka grupo, facebook-paĝo)))	
19 via lingvo		
20 esperanto	<i>El Esperanto en la [... via lingvo ...] tradukis: [... via nomo ...], [... via lando ...] (((+eventuale ankaŭ via kontakteblo, blogo, ktp., se vi permesas tion publikigi)))</i>	

20 via lingvo		
21 <i>esperanto</i>	arhiva kopio de la UN-dokumento:	
21 via lingvo		
22 <i>esperanto</i>	arhiva kopio de la Unesko-retpaĝo:	
22 via lingvo		

Viaj sugestoj/nia peto - por via teknika helpo:

a) vi uzas la vialingvan litertipon (,font‘):

(ekz. tiu ĉi laborfolio estas skribita per la litertipo (font), aŭ karaktro: «Times New Roman») - gravas al ni scii tion ĉe ne-latinliteraj lingvoj, por povi instali la necesan litertipon por nia uzo en la retpaĝo/sur la afiŝo)

b) via cetera sugesto, rimarko:

c) Nia peto: bonvolu - post via tradukado de la opaj teksteroj/alineoj, kaj plenigo de tiu ĉi tabelo per vialingva teksto - registri ĉi tiun dokumenton Word-an ankaŭ en PDF-versio, por povi kompari kaj rimarki eventualan modifiĝon de vialingva teksto en nia komputilo/programo (precipe kaze de ne-latinlitera lingvo). Do, resendu al ni tiun ĉi Word-dokumenton kompletigite kun via tradukrezulto, kaj aldonu ankaŭ ĝian PDF-version, per retmesaĝo adresita al tiuj 2 adresoj:

traduko (ĉe) [linguistic-rights.org](http://www.linguistic-rights.org) + renato.corsetti@gmail.com

GRANDAN DANKON por via valora kunlaboro!

Stefano Keller kaj Renato Corsetti, ĉefkunordigantoj de la agado.